



Kazimierz Kordylewski (1903-1981)

D-ro Leszek Kordylewski



Mi ĝojas pro la ebleco rememorigi mian patron, la mondfaman astronomon K. Kordylewski dum la kunveno de la Esperanto Societo en Ŝikago. Mi ŝuldas al mia patro, ke li insitigis min ekinteresiĝi pri IL. Mia vojaĝo al la UK en Tokio (1965) iel rilatis al la postaj sciencaj malkovroj de mia patro, ĉar venante hejmen de Japanio per ŝipo mi


donis al li la ideon, ke la kargoŝipo en la mezo de oceano nokte en la absoluta mallumo povas bone servi kiel movanta astronomia observatorio. Rezulte de tio, dum postaj jaroj mia patro faris tri ŝip-ekspediciojn al Afriko, kiuj konfirmis liajn plej gravajn malkovrojn de la Polvaj Terlunoj.

Oktobre Planetario de Adler en Ŝikago petis min kontribui al la festado de la 50a datreveno de la konstruo de la unua Sputniko, kiu antaŭ 50 jaroj komencis la novan epokon de la kosmaj esploroj. Mi havas personan ligan kun Sputnik, ĉar mi plej verŝajne estas la unua persono, kiu ekvidis la homkonstruitan novan ĉielan objekton. Pri mia parolado en la planetario raportis "Chicago Tribune" kaj pola gazetaro. Dum la kunveno en Adler la filo de soveta gvidinto, prof. Sergej N. Ĥruŝčov konfirmis, ke tiam en Sovetio la vetero ne permesis la similajn okulajn observon. Male, en la Krakova Astronomia Observatorio, kie mi loĝis kun miaj gepatroj-esperantistoj, la astronomoj penis ekvidi Sputnikon per ĉuj atingeblaj al ili teleskopoj, tuj post la anonco ke Sputniko sukcese ĉirkaŭveturas la Teron. La patro,

surbaze de la raportoj de radiosignaloj, kapablis kalkuli la orbiton de Sputniko kaj antaŭvidi kiam ĝi ekaperos la unuan fojon sur la ĉielo. Li tuj iniciatis la historian observon. Kiel lerta astronomo, K. Kordylewski eĉ rompis la sekreton de la sovetoj, ĉar li kalkulis la forte kaŝitan lokon de la kosmodromo profunde en la Sovetio, de kie Sputniko ekvojaĝis. Surprize evidentiĝis, ke mi estis la unua por ekvidi la novan ĉielobjekton. La teleskopoj, pligrandigante la ŝancon ekvidi malfortan lumon de Sputnik, domaĝe limigadis la vidkampon de la astronomoj, kiuj sekve mistrafis tion, kion mi subite ekvidis tuj post ĝi ekaperis.

Mia patro dum multaj jaroj gvidis en Krakovo la Centron por Observoj de Artefaritaj Satelitoj. Li ekfamiĝis pro la alia originala malkovro de objektoj pli grandaj ol la Tero mem, kiuj akompanas la Lunon, sed estas tre malfacile videblaj pro tre malofta lumado. Li malkovris du novajn naturajn satelitojn de la Tero, kiuj konsistas el grandegaj polvaj nuboj ĉirakaŭantaj la Teron en la distanco de la Luno. Amasoj da materio en tiuj du regionoj de la tera orbito nomataj L4 kaj L5 estus danĝeraj por la kosmaj ŝipoj. Tial NASA ekinteresiĝis pri la malkovro de Kordylewski kaj establis kontaktojn kun li, kiu vivis tiam malantaŭ la fera kurteno en la komunisme regata Pollando, sen ebleco vojaĝi al Usono. K. Kordylewski uzadis bonajn sciencajn rilatojn kun Usono por subfosado de la malamata de ĉiuj soveta politika sistemo en Pollando. Li estis avida populariganto de Scienco, kaj liaj publikaj, radiaj kaj televidaj prezentoj, estis tre ŝataj. Parolante ŝajne nur pri scienco kaj astronautiko, li kaŝe sendadis enkuraĝigajn informojn al la popolo.

Ekzemple, prezentante en la Sovet-Pola Amikeca Asocio atingojn de (soveta) kosma programo, li kuraĝis ilustradi la prelegojn pere de koloraj usonaj filmoj. Oficiale organizante la publikajn prezentadojn de Sputnikoj trapasantaj la ĉielon, li "hazarde" montradis aperojn de multe pli brilaj Usonaj satelitoj kiel Eĥo. Fine, lupreninte rokon, alpotritan de la Usonaj astronautoj de Luno,



li kaŝe organizis ĝian ekspozicion en la privata apartamento, kiun ni okupis en la Observatorio. Miloj da interesitoj konfide informitaj pri tiu ebleco, rigardis la lunan rokon metitan sur nia manĝotablo (vidu la foton), dum la furiozaj komunismaj aŭtoritatoj malpermesis la oficialan ekspozicion de la usondevena specimeno. Post la morto de mia populara patro oni donis lian nomon al unu el la ĉefaj stratoj en lia hejma Krakovo, proksime al la strato de Koperniko, ĉe kiu li loĝis.

Mi ĝojas ke mia prezentado en E-klubejo transformiĝis en la vigan diskuton pri limoj de Scienco, ekzisto de eksterteraj inteligentaj estaĵoj, mistero de la fenomeno de tempo, konflikto inter religio kaj materialismo. Mia patro, kiu publikikadis artikolojn en Esperanto en "Scienca Revuo" kaj "Homo kaj Kosmo" certe fierus, ke ne nur mi instigis ĉiun partoprenantojn ekinteresiĝi pri scienco kaj astronomio, sed ke ni tiel lerte diskutis ĉion en Esperanto, ankoraŭfoje montrante ĝian utilecon por la gravaj celoj, eĉ science kaj filozofie komplikaj.

D-ro Leszek Kordylewski

KUNLABORO

Beograda Esperanto societo "Radomir Klajić" kaj Esperanto-societo de Ŝikago en ĉi tiuj tagoj ekestigis unuajn ligojn. Ideo devenis de la prezidanto de Ŝikaga Esperanto-societo, s-ro Viktor Pajuk. Niaj urboj ĝemeliĝis la 7an de junio 2005. Ĉarton pri la ĝemeliĝo subskribis tiamaj urbestroj Rikardo Dejli kaj Nenad Bogdanoviĉ. Esperantistoj de du urboj planas interŝanĝi per informoj pri aktivecoj por siaj bultenoj, organizi interkonojn kaj personajn kontaktojn dum kongresoj, interŝanĝi per libroj kaj esperantaĵoj kaj partopreni interurban kunlaboron. Unuaj paŝoj jam estas faritaj. Ni esperas ke kunlaboro en estonteco helpos al ambaŭ E-societoj plibonigi lernadon de IL kaj amikajn kontaktojn de esperantistoj el tiuj geografie malproksimaj sed anime proksimaj urboj.

Dimitrije Janićiĉ

UK 2008

Venontjare ni kongresumos en Rotterdamo, nederlanda havenurbo kaj sidejo de UEA, kiu selebros sian unuan 100-jariĝon. Dezirantoj partopreni la jubileon ne perdu eblecon aliĝi ĝis la fino de 2007 laŭ la plej malaltaj prezoj.



Zamenhofa Bankedo 2007!



Dum la lasta klubkunsido plejmulto de niaj membroj esprimis deziron festi Zamenhofan tagon en ĉina bufedo. Estis trovita Nova Ĉina Budedo (New China Buffet) laŭ adreso: 7310 West Foster Avenue, Chicago, IL 60656. Ĝi troviĝas sur vendoplaco ĉe stratkrucro de W. Foster kaj N. Harlem, nur 1 minuto de la 90a rapid-ŝoseo (elirejo Harlem), konvenaj prezoj (ne pli ol \$15), bongusta manĝaĵo, grandega parkejo. Kaj aparta salono je nia dispono (por 3 horoj nur, inter 12.30 kaj 3.30 pt). Bv informi prez. V. Pajuk pri via veno, venigu niajn malnovajn samideanojn, amikojn, familianojn.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

27an de Novembro – elekta kunsido, plan-starigo por la estonto; prelego pri la mondfama E-poeto E. Miĥalskij (1897-1937)

16an de Decembro – Zamenhofa bankedo – en ĉina bufedo

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata; la prelegontoj estas invitataj.

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktor Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

